

Aŭstraliaj Esperantistoj

Novajletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ

Google Translate Plena Ilustrita Vortaro

PLENUMITA 22/06/2017 Tricentdudeksepa eldono (unua eldono 20/09/2011)

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;



Redaktoro Roger Springer

Provlegita de Vera Payne

SENDITA AL 325. La informa kaj noma paĝoj reaperos nur en la dekaj eldonoj



Oni povas meti sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au



Ekstudis pli ol **905,000** lernantoj en la Esperanto-kurso de Duolingo per la angla lingvo. (Ekde la 28a de Majo 2015) <https://www.duolingo.com/course/eo/en/Learn-Esperanto-Online>

Kara Roger,

Jam antaŭ 2 semajnoj estis pli ol miliono da lernantoj en la Esperanto-kursoj de Duolingo. Kial vi ne enkalkulas la lernantojn de Esperanto kiuj lernas per la hispana lingvo? Amike, **Nicole Else**

Bona novaĵo, dankon **Roger Springer**



La Esperanta Retradio donas bonan ĉirkaŭ-5-minutan aŭskultadon/legadon ĉiun tagon.

<http://esperantaretradio.blogspot.co.at/?view=magazine>



La Manlia Esperanto-Klubo

Anoj kunvenas la unuan kaj trian sabaton je la 10atm.

Bavarian Beer Café, Manly Wharf. Unu taso da klubpagata kafo.

La 17an de Junio venis la kutimaj kvin Esperantistoj, Roger, Chris, John, Eunice kaj Ian.



*Mi ĉeestas tiun bonan Esperanto-klubon kaj raportas al AE pri la klubo. **Roger Springer***

“Malgrava historieto pri mia vivo” (Bob Felby)

Nun AE kopias la tutan libreton iom post iom ĝis la fino.

Bona rakonto kaj bona Esperanto

Ĉapitro 1 Mia infanaĝo (10a parto)

Mia paĉjo nomiĝis Karlo, Karlo Gerhardt Felby. Ĉiuj miaj onkloj havis sian propran nomon, ili ne dividis ĝin kun aliaj. Unu nomiĝis onklino Asta, ŝi estis la plej juna, kaj edzino de onklo Karlo. Alia estis onklino Sigrid, ŝi estis edzino de onklo Karlo, alia estis onklino Thora, edzino de onklo Egil, kaj onklino Grethe, edzino de onklo Karlo. Oni povus kredi, ke kompatinda



onklo Karlo havis tri edzinojn, sed ne estis tiel. Li havis nur unu, sed mi havis tri onklojn Karlo, kaj ili ĉiuj havis po unu edzinon !!!

Onklo Egil laboris en la Reĝa Teatro en Kopenhago. Li prizorgis la scenejojn malnovan kaj novan. En sia libertempo li desegnis karikaturon de la famaj geaktoroj, kiuj aktoris sur la scenejo. Kelkfoje li pentris pentraĵojn.

Vi jam scias, ke unu onklo Karlo estis tajloro, kaj tre bona kaj sukcesa tajloro li estis. Li sciis tondi kaj kudri !

Alia onklo Karlo estis meĥanikisto, kiu scipovis veturigi ŝarĝaŭtomobilojn, kaj ĝustigon li faris.

Alia estis laborilfaristo, kaj krom tio li tre ŝatis sporton!

Komenciĝis la dua mondmilito, kaj mi komencis la lernejon. Survoje al la lernejo mi vidis tiom da germanaj soldatoj. Kiam unu el iliaj ŝarĝaŭtomobiloj rifuzis plu iri, estis tiom da velkverdaj uniformoj sur la strato, ke oni kredus, ke Danlando ne plu estas nia. Tio naŭzis min. Tiom da homoj, kaj neniu povis kompreni ilin. Mi preferis resti hejme, sed mia patrino tion ne permesis. Bonŝance la germanoj neniam venis en Gl. Enghave. Ĝi fakte estis sanktejo.

Sed mi devas konfesi, ke tre plaĉis al mi lerni ion. Unue estis al mi malfacile lerni la alfabeton. Daŭris tre longe antaŭ ol mi konis la diferencon inter "b" kaj "d". Ili aspektis al mi la samaj, ĝis iun vesperon Paĉjo decidis helpi min. Tutan vesperon li sidis pacience kun mi. Ekde tiam mi povis legi preskaŭ ĉion, kaj mi fariĝis elstarulo en mia klaso. Post nur unu jaro en la lernejo mi povis legi la ĉiusemajnan gazeton ilustritan, almenaŭ la ilustraĵojn.

Daŭrigota

Bob Felby

Komentoj pri artikoloj en 324

Malfacile tradukeblaj diraĵoj

Marcel prezentis liston de malfacile tradukeblaj diraĵoj en la angla (AE 324 paĝoj 2-3) kaj proponoj de la Melburna Esperanto-Asocio por kiel traduki ilin en Esperanton. Li menciis ke la diraĵoj aperis en la ĵurnalo "The Age". Kelkaj estas mise cititaj. Ekzemple "*keep a close eye at the weather*" devus esti "*keep a close eye on the weather*". Vidu ĉe:

<http://idioms.thefreedictionary.com/keep+an+eye+on>

Mi volas komenti pri iuj aliaj el la listo.

9. "*To have all one's ducks in a row*" signifas esti preparita, bone organizita. Vidu ĉe:

<http://www.dictionary.com/browse/get-one-s-ducks-in-a-row>

11. "*For women, sexual desire is malleable* -- Por virinoj la seksumdeziro estas direkte ŝanĝebla."

"Direkte" rilatas al direkto. Ĉu oni intencis tion aŭ "rekte"? Wells havas la vorton "seksimpulso"; NPIV havas la vorton "seksurĝo". Pli elvoka estus "amora deziro" (vidu sub "amoro" kaj "amorveka" en NPIV). Laŭ Wells, "*malleable*" signifas "martebla"! Sub "maleo" NPIV havas "malei – platebenigi per maleo" kaj "maleebla metalo". Tamen, en la konsiderata citaĵo, "*malleable*" havas pli mildan, metaforan sencon. Eble pli taŭga estas "Ĉe la virinoj, la amora deziro estas influebla".

15. "The country is to keep ships coming in."

- a) La lando daŭros ebligi ke ŝipoj envenu.
b) La lando daŭros reteni ŝipojn envenantajn".

La dua ebleco estas teorie ebla sed malverŝajna. Mi preferas diri "La ŝtato" anstataŭ "La lando".

18. "Time flies like an arrow; fruit flies like a banana" estas la kutima formo de ĉi tiu konata diraĵo. Ĝi estas sprita, kaj ankaŭ utilas por montri malfacilaĵojn kiujn tradukprogramoj provas superi por traduki vortojn kiuj povas havi diversajn funkciojn. Teorie ĝi povas havi multajn tradukojn ("time" povas esti verbo, ktp) sed malmultaj eblecoj estas kredindaj en ĉi tiu okazo. Ĝenerale oni tute ne konsideras la teorie eblan signifon "Mezuru la rapidecon de muŝoj kiel vi mezuras la rapidecon de sago..."

Vidu ĉe:

https://en.wikipedia.org/wiki/Time_flies_like_an_arrow;_fruit_flies_like_a_banana

<https://en.wikipedia.org/wiki/Antanaclasis>

https://en.wikipedia.org/wiki/Garden_path_sentence

<http://quoteinvestigator.com/2010/05/04/time-flies-arrow/>

19. "Atheism is a non-prophet organization -- Ateismo estas neprofeta organizo".

Ĉi tiu estas rara ekzemplo de anglalingva vortludo kiu ankaŭ sukcesas en Esperanto (neprofeta/neprofita).

20. "Act of God" estas jura termino por "naturkatastrofo". Eble "katastrofo" estas tro forta, sed la esperanta termino ŝajne devenas de la franca esprimo "*catastrophe naturelle*".

<https://www.collinsdictionary.com/us/dictionary/english-french/act-of-god>

<https://eo.wikipedia.org/wiki/Naturkatastrofo>

23. "Out of pocket expenses"

Mi supozas ke tio estas anglismo, ĉar Vikipedio ne havas tradukojn alilingvajn. France: "*menues dépenses*" (malgrandaj elspezoj). La ĉefa afero estas ke la elspezoj estas repagotaj de la kompanio por kiu oni pagis. Do, "repagotaj elspezoj".

http://www.proz.com/kudoz/english_to_french/other/553931-out_of_pocket_expenses.html

https://en.wikipedia.org/wiki/Out-of-pocket_expense

24. "I'm going for a dip"

Mi ne komprenas kiel tiu frazo povas signifi "Mi iras batali". Ĉu ĝi estas melburna slango? La citita vortaro informas ke "*to dip*" povas signifi "maĉi tabakon" aŭ "foriri". Tio ankaŭ surprizas min. (En Sidnejo kaj Perto ĝi signifas "Mi iras naĝi" **Roger**)

<http://onlineslangdictionary.com/meaning-definition-of/dip>

25. "A moving scenery in a moving scenery"

Mi ne trovis fonton de ĉi tiu sensenca esprimo. Mi dubas ĉu ĝi estas elpensita de denaska anglalingvano. Mi preferas "*a moving scene with moving scenery*", aŭ "*a moving scene in moving scenery*", sed eĉ tio ŝajnas neprobabla.

"Emociiga sceno en moviĝanta scenejo", aŭ "moviĝanta sceno en emociiga scenejo".

Donald Rogers NZ



KAMPANJO POR INFORMI PRI ESPERANTO EN LA JUNULARA FESTIVALO WOODSTOCK

Woodstock 2016 „Multkultura Vilaĝo – Esperanto”, 13.07.2016



Klaku [Ĉi tie.. Bona filma Informado.](#) (3.37 minuta klarigo. Vidu! Ĝuu!)

Helpu nin kolekti € 4 000 por realigi Esperantan agadon en aŭgusto 2017, dum la junulara festivalo Woodstock.

Ĉiu donaco al tiu ĉi evento estos duobligata de UEA, ĝis la sumo de € 2 000, tiel ke organizantoj ricevos entute la sumon de € 4 000.

Vi povas sendi vian donacon al UEA konto "Informado", aldonante kiel celon: "por Woodstock".

Woodstock estas mondfama kultura festivalo, kie partoprenos pli ol 600 000 junuloj inter la 3-a kaj 5-a de aŭgusto 2017.

Filmeton kaj pliajn informojn vi trovos ĉe www.gazetaro.org/woodstock

Informis **Katja Steele**



Pasivoĉaj Eraroj.



Kiam oni lernas fremdan lingvon, oni neniam pensas, ke oni devas krome zorgi, ke tiu fremda lingvo restu tia kia ĝi estas aŭ ke oni, morale, devas plibonigi ĝin. Oni ne povas kaj oni ne rajtas. La fremda lingvo apartenas al popolo, kaj tiu popolo decidas, subkonscie, kia la lingvo estu, kaj ĉu, kaj kiel, ĝi ŝanĝiĝu.

Se mi estas nederlandano kaj lernas la anglan lingvon, neniu haro sur mia hardensa kapo pensas, ke mi estas parte respondeca pri kiel uzi kaj “plibonigi” la anglan lingvon. Eĉ la elnaskiĝaj angloparolantoj ne opinias, ke ili respondecas pri sia lingvo, tiom kiom ili simple kopias kion la aliaj diras. La lingvo jam estas perfekta por ilia uzo kaj ŝajne disvolviĝas laŭ sia propra volo, kaj ofte kaprice, sen nia interveno. Ĉiu akceptas la lingvon tia kia ĝi estas.

Do estas natura, ke tiuj kiuj lernas Esperanton faras la samon. Ili ne cerbumas ĉu zorgi pri la lingvo, ili simple akceptas ĝin kia ĝi estas, kaj akceptas ke ĝi estas same perfekta por uzado kiel ilia etna lingvo.

Tio kreas problemojn. Pluraj Esperanto-verkistoj kaj redaktistoj kaj lingvistoj enkondukadas, sen ia permeso aŭ kontrolo, novajn vortojn, kaj kelkfoje eĉ novajn gramatikerojn. Pro manko de klareco pri Esperanto ili trovas tion pli facila ol krei vortojn per kombinaĵoj de jam oficialaj vortoj. Aliaj simple kopias ilin pensante, ke tiuj novaĵoj estas oficialaj. Ili neintence polucias Esperanton, ĉar ili neniam lernis, ke estas ilia morala devo zorgi pri la perfekteco kaj fideblo de la lingvo. Se ili sciis ili verŝajne penus uzi la oficialan lingvon, se ili kapablas.

La problemo estas, ke Esperanto estas artefarita lingvo, kaj ke por resti perfekta por internacia uzo kaj por resti fidebla interlingvo inter etnaj lingvoj, ĝi devas resti lingve perfekta por tiuj celoj, kaj do kreski same artefarite kiel ĝi kreas.

La problemo estas pli granda, ĉar ne ekzistas kompetenta instanco kiu rajtas decidi, kio estas gramatike aŭ semantike preferinda aŭ necesa. Grava kaŭzo estas, ke la modernaj Esperantologoj, la spertuloj pri i.a. la gramatiko kaj vortfarado de Esperanto, ne sufiĉe kapablas kompreni la unikan karakteron de artefarita lingvo kia Esperanto, kaj juĝas ĝiajn gramatikajn fenomenojn kvazaŭ ĝi estus nature evoluanta lingvo etna. Pro tiu manko de kompreno ilia juĝo estas kelkfoje malĝusta por Esperanto, kaj la ordinara verkistoj kaj vortaristoj kaj redaktistoj kaj instruistoj konsiderataj kiel la spertuloj, estas akceptataj kiel la ĉiosciuloj kaj tial imitindaj.

Kroma problemeto estas, ke kvankam Zamenhof kreis la lingvon preskaŭ perfekta, li kompreneble faris kelkajn erarojn, ofte pro premo de aliaj Esperantistoj. Tiuj estas unu granda, unu mezgranda, kaj kelkaj malgrandaj eraroj. Bonŝance mi kaj aliaj sukcesis trovi ĝustajn alternativojn laŭ-Fundament’ajn por la eraroj, kvankam multaj Esperantologoj ankoraŭ ne akceptis ilin kaj konsilas al la verkistoj ne uzi ilin, pro miskompreno de la strukturo de Esperanto. Tiuj alternativoj estas uzindaj nur, ĉar ili obeas la regulojn de la Fundamento de Esperanto.

La eraro mezgranda estas, ke Zamenhof kreis kvar tute malsamajn signifojn, kelkfoje kontraŭajn, por la unu prepozicio “de”, kvankam li mem deklaris ke en Esperanto ĉiu prepozicio havas nur unu signifon. Tiun eraron mi antaŭ dudek jaroj korektis kreante, laŭ-Fundament’ece, du novajn prepoziciaĵojn, tiel ke la kvar signifoj nun, se “de” ne klaras, estu “de” por la aparteno, “el” kaj “el de” por la deveno, “ante al” por la gramatika objekto de la

ago, kaj “ate de” por la subjekto de la ago. Do “La murdo de la policano”, kiu ekzamenas tiun murdon, “La murdo ate de la policano”, kie la policano murdis, kaj “La murdo ante al la policano”, kie oni murdis la policanon, ĉiuj por “La murdo de la policano”. Tiu ĉi mezgranda eraro de solviĝis.

La eraro granda estas la manko de verba pasiva voĉo, kies alternativon mi eltrovis pro la Zamenhof’a Regulo pri Signiforeduktado. Tiu alternativo estas nun kreske uzata, sed dum preskaŭ jarcento antaŭ mia eltrovo la Esperantologoj serĉis alternativon. Iliaj proponoj ne akceptatis de la Esperantistaro, ĉar ili ĉiuj baziĝis sur ne-Fundament-ecaj neologismoj. Mia solvo estis uzi la Regulon pri Signiforedukto kaj tiel deklari, ke la sufikso “-at-“ havas nur la signifon de pasiveco, ne de tempo aŭ nefiniteco, sed nur kiam ĝi uzatas kiel verbo, do kun unu el la finaĵoj -ati, -atas, -atis, -atos, -atus, kaj -atu. Ĝin oni malrapide sed kreske akceptas kaj uzas.

Tio speciale utilas pro tio ke nia literaturo daŭre plenas de eraroj en la uzo de la Zamenhof’aj participoj, kiuj ne taŭgas por uzi en la pasiva voĉo. Ekzemple en ĵusa eldono de aŭstralia gazeto mi trovis sur du paĝoj naŭ (9!) erarojn en la uzado de participoj. Jen ili estas: 1e. “Ŝi estis devigata” devas esti “Ŝi estas devigata” ĉar “devigata” estas nefinita ago; 2e. “La hejmo estis bombita” devas esti “estas bombita” ĉar “-is .. -ita” estas du pasintecoj (= preteritoj), do bombardo antaŭ la tempo de la bombardo; 3e. “Lidia estis arestita” d. e. “estas arestita” ĉar “-is .. -ita” signifas ke oni arestis ŝin post aresti ŝin; 4e. “estis mortpafita en januaro 1940” d. e. “estas -ita” ĉar “-is.. -ita” signifas ke ŝi mortpafatis antaŭ tiu dato, pro la du pasintecoj (preteritoj); 5e. “L. Z. kaj W. estis liberigitaj post kvin monatoj” d. e. “-as .. -itaj” ĉar “-is ... -itaj” signifas ke ili liberigatis antaŭ “post kvin monatoj”, pro la du pasintecoj; 6e. “estis senditaj” d. e. “estas senditaj” (aŭ “estis sendataj”) ĉar oni ne povas sendi ilin antaŭ ol oni sendas ilin, pro la du pasintecoj; 7e. “la familio devas esti arestita” signifas ke Hitler diris ke tion oni estus devinta fari antaŭ ol li diris tion; 8e. “antaŭ septembro 1942 la judoj estis ŝovitaj kaj senditaj” signifas erare, ke Lidia estis inter ili kiam ili ŝovatis kaj sendatis; 9e. “kie ŝi estis murdita” d. e. “estas murdita” aŭ “estis murdata” ĉar “-is .. -ita” signifas ke oni murdis ŝin antaŭ ol ŝi alvenis en la gaskameron, pro la du pasintecoj (preteritoj). Kaj krome kelkaj el la de mi ne menciitaj participoj estas iom ĝustaj sed ne komplete.

Kaj en alia raporto (ne en ĉi supra gazeto) mi trovis en iom pli ol du paĝoj dek-kvar (14!) participajn erarojn, precipe pro du pasintecoj en la esprimoj, kiuj ĉiuj do signifis ne kion la verkisto intencis. Jen ili: “dum tiu periodo ĉio estis provizita” kaj “La legado estis akceptita”, kaj “La raporto estis aprobita” kaj “ke ŝi estu dankita” kaj “la raporto estis akceptita”, kaj “Estis akceptite ke” kaj “estis decidite” kaj “la muziko proponita” (d. e. “proponata” ĉar ne la muziko kiun oni jam ludis), kaj “Neniu solvo estis trovita”, kaj “estos ŝanĝita” (= antaŭ oni ŝanĝis ĝin), kaj “En 2015 jam estis konstatite” (=oni konstatis antaŭ 2015), kaj “bezonas esti ŝanĝitaj” d. e. “ŝanĝotaj”, kaj “materialo povas esti disaŭdigita” (d. e. disaŭdigata). kaj “estu daŭre aĉetotaj” d. e. “aĉetataj” ĉar se ili daŭre estas aĉetotaj ni ne aĉetas ilin.

Por Esperanto la afero de la eraroj estas gravega kaj timigege, se la erarantoj ne konscias pri ili. Cetere Zamenhof iel ŝuldas kreante sian pasivan voĉon per adjektivoj anstataŭ verboj. Sed li kreis ĝin tia pro premo de la eŭropaj tiamaj Esperantistoj, kiuj deziris uzi la por artefarita lingvo tre mallogikan eŭropan sistemon plimalbonigante la aferon uzante adjektivojn kie la eŭropanoj uzas verbojn. Kaj malĝustas simple diri “Oh, en tiu kazo ni konsideras ke adjektivoj

estu verboj”. La nun malmoderna duvorta pasiva voĉo estas tiom mallogika, ke kiam la granda gramatikisto Kalocsay ankoraŭ vivis li en speciala kunveno de spertuloj senespere elkriis, ke la participaj adjektivoj estas genia kreo de Zamenhof, sed ke lia sistemo de la pasiva voĉo estas kompleta ĥaoso tiom mallogika ke ĝi estas neuzinda. Sed li ne sciis solvon, ĉar mi tiam ankoraŭ ne inventis ĝin.



Marcel Leereveld.



JUBILEA TEO EL ĈINIO KUN LA NOMO "ZAMENHOF"

Okaze de la jubilea jaro, subtenata de la familio Zamenhof, Pekina Esperanto-Asocio kunlaboras kun ĉina bonkvalita teo-kompanio Haozhan, kiu produktas Teon "Zamenhof" por memorigi nian majstron.

Esperantistoj el 27 landoj kontribuis per nacilingvaj frazoj por reklamo de Esperanto en aldonita folio kun la teo. Nun finiĝis la desegnado de "Teo Zamenhof" kaj komenciĝis la mendo-periodo. En la nuna antaŭmenda periodo ĝis **30-a de junio** prezo de la teo estas 40 juanoj, ĉirkaŭ 5.2 eŭroj, poste la prezo estos 80 juanoj, ĉirkaŭ 10.4 eŭroj. La menditajn teo-pakaĵojn oni povas ricevi ĉu en la UK en Seulo, ĉu en la oktobra festivalo de Teo kaj Amo en Pekino.



Pliaj detaloj kaj antaŭmendo ĉe la adreso: pea126@126.com

Fonto: <https://www.facebook.com/groups/128827667179539/permalink/1449342438461382/?pnref=story>

Info / Lingvo-Studio, LS

<http://www.eventoj.hu>

informis Katja Steele